MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

11

NOVEMBRO 2018 Kol. 403/34

xxxx

la dumviva reprezentanto de San Marino ĉe OSCE (Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo) en Vieno. Bonvenigis nin ankaŭ la itala ambasodoro en San Marino s-ro Guido Cerboni. Poste Javier Alcalde prezentis la kongresan temon "Malgrandaj komunumoj, grandaj valoroj". (Dum la semajno okazis seminario pri tiu temo kun viglaj diskutoj).

Sekvis bonvenigaj vortoj kaj salutoj de kelkaj aliaj Esperanto-organizaĵoj (Junularo, KELI, ILEI, IFEF, LIBE), kaj po unu saluto el ĉiu kontinento. Poste la kursgvidantoj invitis la ĉeestantojn al siaj respektivaj Esperanto-kursoj. Amri Wandel prezentis la 35-an Sanmarinecan Universitatan Sesion (SUS 35) de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) fondita ĝuste en San Marino. Temis pri prelegoj: "Vivo ekstertera" prezentita de Amri mem, "Shakespeare kaj Hamlet" prezentita de Humphrey Tonkin, "Ĝenerala lingvistiko" prezentita de David Astori kaj "Bioenergetiko de la homa organismo" prezentita de Eva Boyadjieva.

En la enirhalo estis instalita ekspozicio pri Marina Michelotti, kiu en San Marino, fondis grupon kaj multe laboris por Esperanto. Alia ekspozicio pri Esperanto kaj pri la aŭtoro de la lingvo L. L. Zamenhof troviĝis en la unua etaĝo. Enhavoriĉa estis la libroservo, kie okazadis libroprezentadoj de diversaj aŭtoroj: Michela Lipari, Carlo Minnaja, Paola Tosato, Humphrey Tonkin. Al interesatoj pri filatelo estis proponata poŝta stampo kaj poŝtkartoj de San Marino jam pretaj por forsendo.

Inter interesaj prelegoj estis tiu pri "Aliaj plan-lingvoj kaj aliaj grandaj valoroj", "Unu lingvo por ĉiuj, al ĉiu la propra lingvo", "Bona Espero en Brazilo", "Religiaj objektoj de naciaj minoritatoj en Bosnio kaj Hercegovino", " La fundamento de novbabelismo", "Enigmoj en Esperanto", "Rolo de Esperanto dum la hispana civila milito".

Kadre de la kongreso kunvenis la itala sekcio de ILEI, Asembleo de la itala instituto de Esperanto kaj ankaŭ gejunuloj havis sian propran programon plejparte vesperan kaj amuzan.
Vendrede Elda Doerfler kun Michela Lipari prezentis la venontjaran Italan Kongreson, kiu okazos en la urbo Triesto de la 24-a de aŭgusto ĝis la 31-a de aŭgusto. Do, vi ĉiuj estas bonvenaj. Poste okazis resumo de la laboroj de la seminarioj, de AIS kaj de E-kursoj.
Neforgesebla travivaĵo estis invito al la itala ambasadejo, kie ni aŭskultis en belega ĝardeno klasik-muzikan koncerton de la fluta kvaropo *Renaissance* kaj poste ni estis invititaj al festeno kun ŝaŭmvino, fruktoj kaj glaciaĵo. Tre alloga estis la oferto de ekskursoj. La partoprenantoj povis ekkoni la urbon San Marino, ĝian unuan turon kaj promeni en pitoreskaj stratoj. En aliaj ekskursoj oni povis vidi la tutan Italion en miniaturoj, viziti la urbojn *Rimini, Santarcangelo di Romagna, San Leo, Cesena kaj Cervia, Urbino kaj Gradara, Ravenna.*

Tre interesa estis la Internacia muzeo pri ceramikaĵoj en *Faenza,* kie ni povis mem krei originalan vazon. En la muzeo de metiejoj ni ekkonis la historion de San Marino kaj la tiaman kamparanan vivon. Poste ni spertiĝis en preparado kaj bakado de speciala plata pano. Dum vesperaj programeroj regalis nin per muziko JoMo en publika parko, poste sekvis trinkmanĝa nokto.

En aliaj vesperoj tie prezentiĝis la italaj kantistinoj Grazia Barboni kaj Chiara Raggi, kiuj ricevis merititan aplaŭdon. En la salono de *Grand Hotel* Mario Migliucci prezentis teatran spektaklon "Unua rigardo". La lastan vesperon tie prezentiĝis la duopo *Evocaré* – Patrizia Bossoni, kiu recitis poemojn en Esperanto kaj kiun akompanis Giuseppe Serafino per piano. Ĉe la fino oni premiis fotojn el la fotokonkurso lanĉita de la gejunuloj. Tiel finiĝis la 85-a Itala Kongreso de Esperanto.

La ĉi-jara kongreso estis vere elstara kaj bonege organizita. Riĉa propono de altkvalitaj prelegoj, en kiu ĉiu povis elekti ion interesan por sia gusto, laŭ la titolo de la prelego aŭ laŭ la preleganto.

Dankegon al la organizintoj el Itala Esperanto-Federacio, kiuj sub la gvido de Michela Lipari preparis neforgeseblan kulturan kaj turisman programon dum tiu ĉi memorinda kongreso.

Liba Gabalda

E-klubo Svitavy solenis komune kun IELBartošovice

En la tagoj 4.-6.8. 2018 mi partoprenis la solenaĵon de 85 jaroj de Esperanto en la klubo Svitavy. Ni tranoktis en malgranda pensiono proksime de la Muzeo de Esperanto. Sabate vespere ni tie kunvenis, bonvenigis la konatajn ĉeĥajn esperantistojn kaj interkonatiĝis kun eksterlandaj gastoj. Ili estis: Martin Stuppnig el Aŭstrio, Karl Hans Schaeffer el Germanio kun sia edzino, la kantistino Anna Bartek (Anjo Amika) el Hungario, la artistino kaj kantistino Jana Mužetskaja el Rusio kaj la redaktorino CRI

(Ĉina Radio Internacia) Zhang Ping (Ĝoja) el Ĉinio kun siaj gepatroj.

La ĉefa programo okazis dimanĉe posttagmeze. Krom esperantistoj partoprenis ĝin la vicurbestro de la urbo Svitavy Mgr. Jiří Petr kaj la direktorino de la urba muzeo Mgr. Blanka Čuhelová.
En la kadro de la solenaĵo transdonis Ĝoja al la urba deputito diplomon „La urbo de teo“, la libron „La rakonto pri teo“, kie estas skribite pri la urbo Svitavy kaj pri ĝia E-klubo kaj pluajn etajn donacetojn kaj poste al ĉiuj ŝi prezentis la ceremonion de teopreparado.Vespere okazis koncerto de ambaŭ kantistinoj, Jana poste recitis la poemon de Otokar Březina „Patrino“ en Esperanto. La tuta solenaĵo estis elsendita en rekta dissendo de „la Verda stacio“ ĉe Jutubo kaj Fejsbuko en la mondon, kion prizorgis Pavel Kaščák.

Lunde nia parto, kiu ankoraŭ plu veturis, vizitis la abismon Macocha (traduke duonpatrino) en Moravia Karsto kaj belajn punkvajn kavernojn pere de ŝipveturo sur la subtera rivero Punkva. Tie ni aŭskultis interesan historion en Esperanton tradukatan de Pavel Kaščák. En Bartošovice ni tranoktis rekte en la kastelo, kie ankaŭ okazis E-kurso en du grupoj. Nia eta grupo dum unu posttagmezo ekskursis al la urbo Nový Jičín al la muzeo de ĉapeloj kaj la duan tagon al savstacio de birdoj.
Merkrede en la Urba biblioteko en Nový Jičín okazis simila programo kiel en Svitavy, sed la programo estis daŭrigita per solena inaŭguro de la ekspozicio pri la filma festivalo „Amo kaj

teo“ en Ĉinio. Ankaŭ tiu ĉi programo estis dissendita en la tutan mondon. Sekvis ĝin esperantistoj el 17 landoj, plejmulte el Svisio, sed ankaŭ el Nov-Zelando kaj Sudafrika respubliko.

Verkis Eva Pazourková, E-tradukis jary

Kiu estis D-ro Viktor Vohryzek?

La kuracisto, verkisto, dramatikisto, ĵurnalisto, filozofo, esperantisto, tradukisto de juda origino.
Doktoro Viktor Vohryzek naskiĝis 1.1.1864 en Přestavlky, vizitis tie judan lernejon, gimnazion en Chrudim, poste li studis medicinon. La kuracistan praktikon li faris unue en Prago en la kliniko de profesoro Thomayer, poste en Vodňany kaj poste multajn jarojn en Pardubice. Kiel kuracisto li estis tre ŝatata inter homoj pro sia sentoplena kaj afabla aliro al pacientoj. Inter alia li savis vivon al la teatroartisto Jaroslav Vojta, kiu volis en Pardubice mortigi sin.

Lia verkaro: kiel filozofo li okupiĝis pri juda demando, pri ĉeĥaj-judaj rilatoj, pri religiaj kaj etikaj problemoj. Li estis ankaŭ skolano de T. G. Masaryk. Li verkis vicon da artikoloj, pripensoj, eseoj kaj felietonoj, kiuj plej ofte estis publikigitaj en la gazeto Rozvoj, kiun li mem fondis en la jaro 1904 kaj en pluaj judaj kaj nejudaj gazetoj. Elektoj de tiu ĉi kreaĵo, eldonitaj bedaŭrinde nur post lia morto nomiĝas „Vivodaŭra saĝeco (1925) kaj „Al juda demando“(1927).
Beletra verko prezentas du dramojn el la juda medio kaj vico da rakontoj kaj beletraj felietonoj. Pri la dramo „Doto“ kaj ne tute klara aŭtoreco ni aludis jam ĉe la kapvorto „Stanislav Schulhof“. La dua ludo nomiĝas „La ruĝaj bidoj“ kaj prezentas medion de judoj en la ĉeĥa kamparo.
La loko de la ludo estas lia naskiĝvilaĝo Přestavlky.

La rakontoj havas diversajn temojn, kelkaj estas inspiritaj de lia infanaĝo, en aliaj estas videblaj spertoj el la kuracista praktiko. Li verkis ankaŭ kelkajn poemojn, sed ili ne atingis tian nivelon kiel la rakontaĵoj kaj dramoj. Pli bonaj estas aforismoj, publikitaj en Tribuna, Ĉeĥojudaj listoj kaj pluaj ĵurnaloj kaj gazetoj.



El la traduk-agado de Viktor Vohryzek estas la plej signifa traduko al germana lingvo “Bapto de sankta Vladimiro“.

Doktoro Vohryzek estis agema ankaŭ en E-movado, multjara amiko de d-ro St. Schulhof, ankaŭ iliaj tomboj troviĝas unu apud la alia; sed post la jaro 1945 d-ro Vohryzek estis preskaŭ forgesita. Li mortis 27. 11. 1918 en Pardubice.

tradukis Jarmila Rýznarová

Ni rememoras ankaŭ pluajn niajn membrojn, kiuj forpasis en la jaroj finiĝantaj per la numero „ok“.
Ekzemple d-ro Jozefo Hradil forpasis en oktobro 2008. Li estis ankaŭ E-instruisto de Jozefo Vaněček, kiun li instigis post la fino de kurso por komencantoj fondi la kolektivon de handikapuloj kaj de tiu tempo niaj membroj dufoje jare venadas lerni Esperanton en lian pensionon al Skokovy. Kaj Jozefo Vaněček, fondinto de AEH kaj de la monata gazeto Informilo forpasis en la jaro 1998. red.

La deka fondo-datreveno de la Esperanto-muzeo en la ĉeĥa urbo Svitavy

La 14-16an de septembro 2018 realiĝis en Svitavy solena semajnfino, kiu kunvenigis preskaŭ kvindekon da partoprenantoj, inkluzive de gastoj el Slovakio, Hungario kaj Francio. Krom la torto kun verda stelo atendis ilin bunta programo.
Vendrede vespere estis inaŭgurita nova tutjara ekspozicio "10 jaroj de la muzeo kaj 100 jaroj de la respubliko".

Dum la sabata solenaĵo oni povis sekvi bilde kaj rakonte resuman historion kaj atingojn de la muzeo. Kadre de la alparoloj prezentis sin interalie, la urbestro de Svitavy kaj la direktorino de la urbaj muzeo kaj galerio, sen kies subteno la projekto ne povus sukcese evolui. Ĝojigaj estis salutleteroj el la Ministerio pri kulturo de Ĉeĥio kaj precipe la salutoj el eksterlando, kio montris al la niaurbaj reprezentantoj unikecon de la internaciaj kontaktoj, kiujn Esperanto ebligas.

Sekvis ekskurso al la proksima renesanca urbo Moravská Třebová, koncerto de la ensemblo *Senprobleme* kaj amuza vespero. La dimanĉo estis dediĉita al Internacia Muzea Seminario, unuafoje okazinta en Svitavy. La du ĉeftemoj estis "Rezultoj de memstaraj esploroj pri la historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio en 1918-1968" kaj "Spertoj pri

ciferecigado de dokumentoj kaj ilia utiligo en la muzea kaj biblioteka praktiko”. Laŭ ĈEA

Parolu foje kun vi mem!

Kiu mallaŭte sencele murmuradas, tiu rapide estas konsiderata freneza de sia socia medio. Sed psikologoj malkovris, ke paroladoj kun si mem, ne estas signo por frenezo. Male ili estas ege utilaj.

Okazis antaŭ nelonge en iu parkumejo: "Kie mi havas mian ŝlosilon?", murmuras sencele juna virino, dum ŝi serĉas ekscitite en sia manpoŝo. Respondon ŝi ne ricevas, ĉar estas tie neniu, kiu povus reagi al ŝia demando. Homoj, kiuj laŭte sencele babiladas, sed kiuj evidente ne havas kunparolanton, montras strangan impreson. Sed usonaj esploristoj taksas, ke 96 procentoj de ĉiuj plenkreskuloj jen kaj jen parolas kun si mem. Do paroladoj kun si mem ŝajnas esti io tute normala. Kaj ekspertoj konsideras ilin eĉ ege sencohava instrumento de pensado.

Tiuj paroladoj plenumas tute malsamajn funkciojn: Niaj pensoj ne estas strukturitaj. Parolado kun si mem povas helpi por ordigi la pensojn kaj analizi ilin. Krome tia aŭtokomunikado povas esti bona valvo por malkonstrui streson. Kaj monologoj helpas la homon motiviĝi kaj atingi la alstrebatajn celojn.

Ne estas senkaŭze, ke parolado kun si mem en altproduktiva sporto estas konsiderata taŭga rimedo por atingi pli bonajn

rezultojn. Pro tio spektantoj vidas sportistojn en la pintaj situacioj ofte ne nur koncentriĝintaj kaj direktintaj al si mem, sed ankaŭ sencele murmurantaj. Unuflanke la sportistoj motivigas sin ekzemple per vortoj "Vi atingos tion!" aŭ ili revokas al sia memoro ankoraŭfoje sinsekvojn de movoj. Futbalistoj povas antaŭ la 11-metra puŝo de la pilko ekzemple mallaŭte diri al si mem: "Mi celas la pilkon nun dekstren supren en la angulon".

Paroladoj kun si mem estas ankritaj jam frue en la homa konduto. En la aĝo de du jaroj infanoj komencas kultivi la monologon proprainiciate. Ili daŭre babilas tute senĝene. Tiel ili fokusigas sian atentemon, ordigas pensojn kaj okazaĵojn. Jam en la jaro 2007 iu psikologo de la universitato en Fairfax, Virĝinio publikigis studaĵon, kiu montris ke la tri- ĝis kvinjaraĝaj infanoj, kiuj parolas kun si mem, povis solvi enigmojn pli rapide ol infanoj, kiuj ne povis paroli kun si mem.

Gepatroj do neniel malhelpu infanojn, ke ili parolu monologe. Ĉar la aŭtokomunikado havas ankoraŭ alian gravan funkcion: "Ĉe infanoj la parolado kun si mem ankaŭ multe rilatas al la akiro de lingvo. Ili lernas nomi objektojn kaj ekzercas la prononcon." Ekde la kvina vivojaro tiu konduto tamen signife malkreskas. Se troviĝas ankoraŭ iu alia en la ĉambro, la infanoj elparolas siajn pensojn pli kaj pli ofte flustrante, antaŭ ol ili konservas la pensojn - kiel tion faras plenkreskuloj - iam tute por si mem.

Sed monologoj helpas ankaŭ en plenkreska aĝo: Psikologoj de la universitatoj en Bamberg kaj Vieno povis pruvi tion per eksperimento: Ili igis studentojn desegni kaj konstrui apogilojn

por bicikloj kaj la psikologoj observis la studentojn ĉe tiu laboro per video-registraĵoj. Aparte bone kaj rapide desegnis la partoprenantoj, kiuj daŭre demandis sin: "Ĉu mi faru tion tiel aŭ tiel ĉi?" Tiuj studentoj estis dum sia laboro signife pli koncentriĝintaj.

Do parolado kun si mem apenaŭ rilatas al psika afekcio. Neniu, kiu parolas kun si mem, devas timi freneziĝon. Ĉar la monologado ĉe psikaj afekcioj havas alian kvaliton. "Sanaj homoj ekkonas, de kie venas la voĉo, kun kiu ili parolas", klarigas psikologo.

Homoj, kiuj suferas pro psiĥozo aliflanke, ne kapablas distingi, ĉu la voĉo venas de interne aŭ de ekstere. Tiaj homoj ekzemple ripetas ĉiam la samajn frazojn aŭ en publikaj lokoj laŭte diskutas kun si mem. Kiu aliflanke parolas dum serĉado de ŝlosilo por la aŭtomobilo, al tiu murmurado eble servas por trovi la ĝustan ideon. Transprenite el retradio

La renkontiĝo kun beogradaj esperantistoj

En la jaro 2015 mi unuafoje vizitis Beogradon kaj konatiĝis kun tiulokaj esperantistoj – Tereza, Bojana kaj Dimitrije. Ekde tiam, kiam mi vizitis Beogradon, mi aranĝadis renkontiĝon kun ili en malgranda, hejmeca Serba kafejo…

Ankaŭ en tiu ĉi oktobro mi restadis dum unu semajno en la Universitato en Beogrado kaj tradicie mi renkontiĝis kun miaj geamikoj – Bojana kaj Dimitrije.

La Serba kafejo ne funkciis, do ni kunveniĝis en alia kafejo proksime de iama Serba kafejo. Dum la varma, preskaŭ somera

vespero trinkante ĝustan serban kafon, likvoron „*Gorki list*“ kaj manĝante la dolĉaĵon „*Kotora kremkuko*“ ni babilis, rememoris kongresojn, esperantistajn geamikojn en diversaj E-kluboj kaj landoj – ankaŭ en Pardubice.

Ĉar Dimitrije ne abonas Informilon, mi donacis al li la lastan numeron de Informilo kun Antaŭen, kiun mi kunprenis kaj legis dum la trajnvojaĝo en Beogradon. Adiaŭante petis min Bojana kaj Dimitrije saluti geamikojn en Pardubice. Do, estu salutataj, karaj geamikoj (ne nur) en Pardubice.

Jaroslav Matuška

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.